

Kiel agadi por kaj per Esperanto

Diskutrondo okazanta ĵaŭde vespere (18:15-20:00) en la Ĉerizejo gvidata de Didier Janot

La **3an de oktobro 2013** ĉeestis : Abdel Nouri, Kévin Morel-Fourrier, Christian Legrand, Didier Janot.
Du aliaj homoj antaŭe sciigis sian intereson kaj ne eblon ĉeesti : Veronika Poór kaj Raymonde Coquisart.

Aldone la diskuton, Abdel laboris por refunkciigi la telefon/ret-aliron eĉ post la fino de la kunveno.

Unue ni pridiskutis la konsiston de "Agadi por kaj per Esperanto".
Venis kelkaj ideoj pri kiuj ni provis diri ĉu ili estas agadoj por aŭ per. Foje ne estis tiel facile. Jen kelkaj :
lerni Esperanton, per ? por ?
instrui Esperanton, per ? por ?
varbi homojn ; ĉu oni varbas por Esperanto aŭ por asocio ? Ĉu varbado vere varbas ? per
informi homojn pri Esperanto, per
partopreni renkontiĝon, per
legi librojn, gazetojn, ĉefe per, iom por
paroli kun aliaj homoj, per
gasti, gastigi, per

Ni poste diskutis pri la programo de la venontaj kunvenoj. La ideo estas elekti unu temon por ĉiu ĵaŭdo. Se utilas, ni povos daŭrigi la diskuton pri iu temo dum pluraj kunvenoj.

La unue proponita listo de temoj estas :

- kiom da homoj en la mondo, en Francio, konas Esperanton ?
 - kial la publiko interesiĝus pri Esperanto ?
 - kiaj homoj povus interesiĝi pri Esperanto ?
 - kiajn homojn ni informu ? kiel ?
 - kion ni atendu de informitaj homoj ?
 - kial esperanto-parolantoj aliĝus al Esperanto-asocio(j) ?
 - kion deziras asoci-membroj ?
 - kiel utiligi Esperanton ?
 - al kio utilas scipovo de Esperanto ?
 - ĉu esperantistoj estas lernantoj, lernintoj, instruantojn, instruontoj ?
- Dum la diskuto, aldoniĝis du aliaj temoj :
- pridiskuti la strategian laborplanon de UEA
 - pridiskuti la agadplanon de Espéranto-France

La **10an de oktobro 2013** ĉeestis : Abdel Nouri, Christian Legrand, Didier Janot.

La temo de la diskutrondo estis :
kiom da homoj en la mondo, en Francio, konas Esperanton ?

Sufiĉe rapide venis unua propono :

- ĉar proksimume 1000 homoj partoprenas UKon,
- 10.000 homoj bone parolas Esperanton,
 - 100.000 homoj malpli bone parolas Esperanton,
 - 1.000.000 homoj paroletas Esperanton.

Poste venis demandoj :

- ĉu la partoprenantaro de Ukoj bone respegulas la esperanto-parolantaron ?
- kion signifas "bone/malbone paroli Esperanton" ?

Iom poste venis alia grava demando :

- kion signifas "koni Esperanton" ?
- ĉu paroli Esperanton je iu nivelo ?
- ĉu scii ke ekzistas Esperanto ?
- ĉu scii kio estas Esperanto ?

Ni decidis provi respondi tiun lastan demandon, kaj poste longa elpensado proponis tiujn kategoriojn, konsiderante ke ĉiu grupo estas parto de la supra grupo :

0. la tuta homaro, aŭ loĝantaro de iu lando,
1. homoj kiuj konas la vorton Esperanto,
2. homoj kiuj scias ke Esperanto estas lingvo,
3. homoj kiuj scias ke Esperanto estas lingvo vivanta,
4. homoj kiuj komencis lerni Esperanton,
5. homoj kiuj konas la bazojn de la lingvo sed ne kapablas uzi ĝin ($\approx A1$),
6. homoj kiuj havas sojlan nivelon kaj kapablas elturniĝi ($\approx B1$),
7. homoj kiuj bone regas Esperanton kaj kapablas flue sin esprimi ($\approx C1$),
8. homoj kiuj kapablas uzi Esperanton kiel denaskulo ($\approx C2$).

Ni ne konsideris la grupon de eo-denaskuloj, sed tamen scias ke ili estas pli malpli 2.000 en la mondo.

Ni nin demandis ĉu ni devus konsideri la opinion de homoj pri Esperanto (ĉu ili bone taksas la lingvon, ĉu ili pensas ke Esperanto taŭgas por internacia komunikado...). Tia opinio iom rilatas pri kono de Esperanto, sed nur parte. Sed finfine, ni rezignis pri tio.

Ni ankaŭ nin demandis ĉu ni devus konsideri la aktivecon aŭ la membrecon de homoj ĉe eo-asocioj. Sed finfine ni decidis ne uzi tiun difinon ĉar ŝajnas ke nur parto de Esperanto-parolantoj membras asocio(j)n, aliaj membras plurajn asociojn... Membreco aŭ aktivado nur parte rilatas al la regado de Esperanto. Tiun temon ni devos trakti dum alia kunveno.

Ni ankaŭ parolis pri lernantoj/instruantoj de Esperanto. Sed ekzistas lernantoj de tre diversaj niveloj ekde komencanto ĝis alta nivelo. Eĉ ĉe instruantoj, la niveloj malsamas. Lerni kaj instrui ankaŭ rilatas al aktivado. Do finfine ni ne uzis tiun difinon.

Ni ankaŭ parolis pri eo-ekzamenoj pri kiuj ni havas precizajn ciferojn. Sed nur 1.300 homoj trapasis oficialajn ekzamenojn, do evidente nur eta parto de la eo-parolantaro. Do tiuj ciferoj ne uzeblas por nombri la esperanto-parolantojn.

La **24an de oktobro 2013** ĉeestis : Abdel Nouri, Christian Legrand, Didier Janot.

Ni provis nombri la homojn de ĉiuj kategorioj komencante kaj de la unua kaj de lasta.

Loĝas 7 miliardoj da homoj en la mondo kaj 66 milionoj en Francio.

Sciante ke ekzistas proksimume 2000 eo-denaskuloj, ke homoj kiuj regas Esperanton je C2 nivelo estas homoj kiuj uzas ĝin sufiĉe ofte kaj delonge, ni estimis ke ili estas proksimume kelkaj miloj en la mondo. Pro facileco ni elektis la kvocion 1 homo el 1 miliono en la mondo regas Esperanton je C2 nivelo, tiu estus 7000 je monda nivelo. Certe la reala nombro, kiu estas nekontrolebla, povus estis duone aŭ duoble sed ni opiniis ke tiu kvociento estas bona estimo.

Por la alia kategorioj ni decidis kalkuli ilin uzante la kvocion 1/10 inter ĉiuj kategorioj. Se la reala kvociento estus inter 1/5 kaj 1/20 certe, ju pli oni aplikas ĝin ju pli la precizeco de tiuj metodoj malpli boniĝas.

Laŭ tiuj metodoj, la nombroj estus la jenaj :

- 1/1.000 homoj (7.000.000 en la mondo) konas la bazojn de la lingvo sed ne kapablas uzi ĝin ($\approx A1$),
- 1/10.000 homoj (700.000 en la mondo) havas sojlan nivelon kaj kapablas elturniĝi ($\approx B1$),
- 1/100.000 homoj (70.000 en la mondo) bone regas Esperanton kaj kapablas flue sin esprimi ($\approx C1$),
- 1/1.000.000 homoj (7.000 en la mondo) kapablas uzi Esperanton kiel denaskulo ($\approx C2$).

Poste, ni trairis la aferon ekde la alia parto. Ni provis nombri la homojn kiuj jam aŭdis pri Esperanto kaj scias kio ĝi estas.

Antaŭ kelkaj jaroj, okazis enketo en Francio pri tio. Surstrate oni alparolis homojn kaj demandis ilin ĉu ili jam aŭdis pri Esperanto. Pli malpli 40% respondis "jes" ; al tiuj homoj oni demandis kion ili scias pri Esperanto. Aperis ke grandparte el ili faras rilaton kun lingvo, sed ne pri vivanta lingvo. Ĝenerale ili pensas ke Esperanto estas projekto de lingvo aŭ kaduka aŭ fiaskinta aŭ similaj aferoj. Sed preskaŭ neniu scias ke Esperanto estas vivanta lingvo monde uzata de homoj. Alia afero estas ke homoj kiuj pensas koni Esperanton (la 40% kiuj respondis "jes" al la unua demando) estas ĝenerale maljunaj. Grandparto de la junuloj respondis "ne" al la unua demando.

Pri lernado de Esperanto, en Francio, oni scias ke proksimume 500 homoj komencas lerni Esperanton per ikurso kaj elektas korektanton. Tio estas proksimume 1/1500 homoj de iu jara generacio. Tamen nur parte el homoj kiuj komencas lerni per tiu metodo elektas korektanton. Multaj (ek)lernas sen registri ; eble nur unu el tri aŭ kvar elektas korektanton. Eblas ankaŭ lerni Esperanton per alia metodo. Finfine ni konsideris ke eble 3/1.000 homoj eklernas Esperanton en Francio. Ĉar ni ne havas indikon pri aliaj landoj, ni decidis konservi la samajn nombrojn, eĉ se la metodoj uzataj laŭ la mondopartoj povus esti malsamaj. Se oni faras la rilaton inter tiuj ciferoj kaj la aliaj, 1/3 homoj kiuj eklernas Esperanto ne rezignas tro frue kaj atingas la unuan ŝtupon ($\approx A1$).

Jen la tuta tabelo :

40% de la homoj konas la vorton Esperanto,

30% de la homoj scias ke Esperanto rilatas al lingvo

1-2% de la homoj scias ke Esperanto estas vivanta lingvo monde uzata de homoj,

3/1.000 homoj (21.000.000 en la mondo) komencis lerni Esperanton;

1/1.000 homoj (7.000.000 en la mondo) konas la bazojn de la lingvo sed ne kapablas uzi ĝin ($\approx A1$),

1/10.000 homoj (700.000 en la mondo) havas sojlan nivelon kaj kapablas elturniĝi ($\approx B1$),

1/100.000 homoj (70.000 en la mondo) bone regas Esperanton kaj kapablas flue sin esprimi ($\approx C1$),

1/1.000.000 homoj (7.000 en la mondo) kapablas uzi Esperanton kiel denaskulo ($\approx C2$).

Ĉu tiuj nombroj same validas laŭ la landoj, laŭ la mondoparto ?

Probable, ne.

Ĉu tiuj nombroj spegulas la realon ?

Oni povas nur kompari kun aliaj ciferoj jam publikigitaj. Pli malpli legeblas ke estas inter 100.000 kaj

10.000.000 Esperanto-parolantoj. Sed mankas la difino de Esperanto-parolantoj. Eble tiuj ciferoj validas laŭ la lingvo-kapablo.

Ĉu tiuj nombroj estas altaj aŭ malaltaj ?

Se ekzemple oni konsideras la homojn kiuj kapablas elturniĝi per Esperanto ($\approx B1$),

700.000 homoj kiuj kapablas elturniĝi per Esperanto estas sufiĉe granda kvanto,

sed se oni alparolas hazarde homon sur strate, oni havas nur unu ŝancon el 10.000 esti komprenata, do laŭ procente estas sufiĉe malgranda kvanto.

La 21an de novembro 2013 ĉeestis : Abdel Nouri, Didier Janot.

La temo estis : kial la publiko interesiĝus pri Esperanto ?

Homoj povas interesiĝi pri Esperanto

pro profesiaj kialoj (ĵurnalistoj, lingvistoj, politikistoj...) kaj ne por Esperanto en si mem ;

plej ofte politikistoj interesiĝas pri tio, kio interesas siajn voĉdonantojn

por vojaĝi, renkontiĝi, muzikumi (ĉefe junuloj).

por interrilati, por pasi la tempon i.a. dum kursoj (ĉefe maljunuloj)

pro scivolemo pri io stranga

Dum kursoj videblas tre diversaj homoj : de ĉiuj aĝoj, studentoj, laboristojn, senlaboruloj, emeritoj, de ĉiuj profesioj (iom pli da instruistoj, informatikistoj...). Kelkaj jam memlernis Esperanton antaŭe (tiuj homoj estas ĝenerale pli motivitaj).

Ni konstatis ke ne ekzistas tre agemaj/organizitaj fakaj grupoj (krom fervojistoj kaj SAT-Amikaro).

Poste ni parolis pri agadoj por Esperanto. Ni konstatis ke ofte agadoj por Esperanto ne produktas tujan rezulton. Homoj kiuj venas al Esperanto, ĝenerale jam aŭdis pri Esperanto plurfoje kaj la afero maturiĝis ĉe ili dum tempo sufiĉe longa antaŭ eklernado de Esperanto.

Venontaj diskutrondoj okazos en januaro 2014